

& Poploj en aleo:

< Rekante 9 el 19 batoj por strofo, entute 342 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Mondo kaj koro, 1921). Baladigis Martin Strid (2015) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:19> (

/do do remi fafa rere; Ti TiTi dore mimi dodo;

(#Rekantaĵe: do dodo remi fafa rere; Ti dore mi do)

)×18)+

(&Strofoj:

'1 ... /Poploj staras en aleo... ; Ekiras
vent' kun laŭta veo.

(×:; **Dance aŭskultu la rakonton ;
Paŝu renkonte.**)

'2 Ŝirita, trema ĝemospiro. ; Jen: venta
kanto pri l' sopiro.

'3 Kaj dum la vento vee blovas, ; La
poploj treme sin ekmovas.

'4 l' unua klini sin komencas, ; Ĝi al la
dua riverencas,

'5 Sed ĝi al tiu vane zumas, ; La trian
tiu amindumas.

'6 La tria flustras al la kvara ; Kun ama
tremo foliara,

'7 Kaj tiel plu ... jen lud' sencela ; Kaj
malfeliĉa kaj kruela

'8 Kaj en la tuta vic' la sama: ; Rifuz' de
am', petego ama...

'9 Sovaĝe hurlas jam la vento: ; Sopir',
sopir', sopir', turmento...

'10 Sovaĝe ĝemas arb' vipata ; De la
sopiro senkompata...

'11 Reklini sin ... kaj miksus drone ; Sin
branĉ' kun branĉ' kaj estus bone,

'12 Sed la proksim', la certa havo ;
Senloga estas kaj sen ravo,

'13 Sopiro je l' neatingebla: ; Jen flam'
de l' kor' neestingebla...

'14 Ho, steloj en la frosta alto! ; Facila
nub' en flug' sen halto!

'15 Flor' sur la pint' de l' roko kruta! ;
Sur frosta lip' rifuzo muta!

'16 Ho, flor' ravanta de l' deziro, ; Ho,
flor'—velkonta post deŝiro!

'17 Ĉu veas, plendas nun la vento ; Sub
vip' sovaĝa de l' turmento,

'18 Aŭ, dum ni en doloro dronas, ; Ĉu
rid' infera ĝia sonas?)